

Vlastimil Novobilský

Ota Ginz

Esperantisto en Ĉeĥoslovakio

Resumo

Ota Ginz apartenis al la gvidaj personecoj de la esperantista movado en la antaŭmilita kaj ankaŭ postmilita periodoj en Ĉeĥoslovakio. Lia agado en la postmilita periodo finiĝis en la jaro 1956, kiam li, kune kun siaj edzino Marie kaj filino Eva, transloĝiĝis al Israelo, kie li mortis la 29-an de februaro 1976.

Karakterizaj trajtoj de Ota Ginz estis nelacigebla fervoro en liaj por- kaj peresperantaj laboroj kaj altnivela prilaboro de ĉiu komencita tasko. Per la uzo de Esperanto kiel pont-lingvo li donis imitindan ekzemplon por la kulturado de internacia interŝanĝo sur literatura kampo. Lia nomo daŭre apartenos al la Esperanta kulturhistorio.

Konciza biografio

Ota Ginz naskiĝis la 19-an de julio 1896 en la vilaĝo Ždánice, proksime de la ĉefurbo Prago (Praha), Ĉeĥoslovakio, en juda familio. Kiel antaŭlerneja infano li kun siaj gepatroj kaj kvar gefratoj transloĝiĝis al Prago. Krom lia patro, mortinta en 1912 pro malsano, ĉiuj liaj parencoj, t.e. patrino, kvar gefratoj kun iliaj familioj, kaj lia filo Petro naskiĝinta en 1928, pereis dum la Dua Mondmilito per nenatura morto fare de Hitleranoj.

Antaŭ la soldatservo, li eklaboris ĉe la firmao "Ŝpin- kaj tekstilfabriko" de Stein kaj kompanio. Post la Unua Mondmilito li revenis al iom simila entrepreno kaj atingis tie la postenon de ĉefo de eksterlanda komerco. Li konis kelkajn fremdajn lingvojn, germanan, anglan kaj francan, kiuj helpis lin en lia ofico. En militkaptiteco li parte ellernis la rusan, parte li konis ankaŭ la hebrean, hungaran kaj ciganan lingvojn.

Komence de la Unua Mondmilito, en aprilo 1915, li soldatiĝis en la aŭstro-hungara armeo. Post la mondmilito li servis en la ĉeĥoslovaka armeo; li definitive forlasis ĝin en 1924. Siajn militajn travivaĵojn li priskribis en taglibro, kiu estis skribita per malnovsistema stenografio, kies deĉifrado post lia morto estis ekstreme malfacila. Dum la milito soldato Ginz trairis diversajn landojn kaj la italan kaj galician frontojn. La 8-an de aŭgusto 1916 lia taglibro seke konstatas: "Mi estas en la rusa kaptiteco." Laŭ lia konstato li kaj aliaj ĉeĥoj estis bone akceptitaj de la rusoj. Ili laboris diversloke malantaŭ la fronto, ekzemple ankaŭ en la azia parto de Uralo. Ili suferis pro malpuro, malsato, frosto, puloj, pedikoj ktp. En sia taglibro li priskribas diversajn tiutempajn politikajn eventojn, sed estas videble, ke li, same kiel aliaj militkaptitoj, ne kapablis ĉion bone pritaksi kaj kompreni (ekz. la signifon de la Oktobra Revolucio por estonteco). Surpriza fakto estis, kompare kun la kondiĉoj dum la Dua Mondmilito, ke la militkaptitoj povis ricevi el sia hejmo leterojn kaj eĉ monon.

Tre interesa vivepizodo de Ginz okazis en 1918, kiam li laboris en rusa muelejo en Pleŝakov. Ĝin posedis, krom aliaj, ankaŭ la riĉulo kaj kozako Aleksandr Miĥajloviĉ Ŝoloĥov, patro de la poste mondkonata verkisto Miĥail Aleksandroviĉ Ŝoloĥov, kun kiu Ginz amikiĝis.

La 19-an de junio 1918 li forlasas la muelejon. De Ŝoloĥov Ota Ginz ricevis leteron kaj adresojn de siaj konatoj en diversaj vilaĝoj (ĥutoroj) kun peto, ke ili donu al li manĝaĵojn kaj tranokteblon. Tiamaniere li trairis la distancon de Pleŝakov al la fervoja stacio Millerovo. Per ŝarĝvagonaro li veturis tra Lugansk kaj Jekaterinoslav al Rumanio, de tie al Hungario, aŭstria Salzburg kaj fine al Prago. En la ĉefurbo li estas atestanto de entuziasma akcepto

de la ekesto de la sendependa Ĉeĥoslovaka Respubliko, sed ankaŭ de la manifestiĝo de kontraŭjuda sinteno de parto de la loĝantoj.

Pasis 20 jaroj de la memstara Ĉeĥoslovaka Respubliko. En la najbara Germanio sonis pli kaj pli laŭte la kontraŭĉeĥaj kaj kontraŭjudaj historiaj paroloj de Hitler kaj liaj kunuloj. Venis malbonaŭgura tago, kiam estis subskribita la Munkena Interkonsento, per kiu estis fakte subskribita la likvido de Ĉeĥoslovakio. La sisteman kontraŭjudan politikon de la faŝisma Germanio baldaŭ eksentis ankaŭ la familio Ginz. Kun sia edzino, la arja ĉeĥino Marie (poste nomata Mirjam), li havis du infanojn, Eva kaj Petro. Pro la fakto, ke la du infanoj devenis el miksita familio, ili devis foriri al la koncentrejo Terezín (Theresienstadt) en norda Bohemio nur post la atingo de 14 vivojaroj. Petro estis deportita al Terezín la 24-an de oktobro 1942. La vivo en Terezín estis iom pli milda ol en aliaj koncentrejoj, sed ĝi estis nur antaŭŝtupo por amasekstermaj koncentrejoj.

Pro malsano ilia patro, Ota Ginz, alvenis al la koncentrejo Terezín iom pli malfrue. Judoj kaj iliaj infanoj estis transportitaj el Terezín per vagonaroj al aliaj koncentrejoj, kie ili plejparte trovis morton. La 28-an de septembro 1944 Petro estis fortransportita al Auschwitz, kie li, en aĝo de nur 16 jaroj, tuj estis mortigita en gaskamero.

Ota Ginz kaj lia filino Eva post la milito revenis de Terezín hejmen. Vane ili atendis la revenon de Petro, pri kies sorto ili sciis nenion. La espero estingiĝadis ĉagon post tago. Ginz en senespera animstato sendis leteron al sia konato Miĥail Aleksandroviĉ Ŝoloĥov petante lin pri informo, ĉu eble Petro ne estis fortrenita dum la militjaroj en Sovetunio. La respondo estis negativa. Malfeliĉo regis en la nekompleta familio Ginz, simile kiel en miloj da aliaj familioj, same sortotrafitaj.

Kelkaj notoj pri Petro Ginz

Petro estis multflanke talentita knabo. Li desegnis, skribis artikolojn, eĉ romanojn. Li konatiĝis kun Esperanto hejme, ĉar liaj gepatroj parolis ĝin de mateno ĝis nokto. Li provis en la getto Terezín kompili Esperantan-ĉeĥan vortaron laŭ sia memoro. Du paĝoj de la vortaro saviĝis kaj estas nun konservataj en la Art-Muzeo Jad Vaŝem en Jerusalemo. Doron Modan en sia artikolo "La esperantisto, kiu vojaĝis el la getto al la kosmo", aperinta en *Israela Esperantisto*, n-ro 141 (decembro 2004), prezentis unu el ili, nome la paĝon 66, kaj konstatas: "Pri la celo de la vortaro Esperanto-ĉeĥa kompilita en la getto ni eble neniam ekscios."

La tuta mondo sciigis pri Petro Ginz, la filo de geedzoj Ginz, lige kun la averio de la usona raketoplano Columbia (la 1-an de februaro 2003), en kiu pereis, krom ĉiuj aliaj, ankaŭ membro de ĝia ekipo Ilan Ramon el Israelo, la unua israela astronauto. Li kunprenis en la raketoplanon, krom kelkaj religiaj objektoj, ankaŭ desegnaĵon de Petro Ginz "Luna pejzaĝo". Ĝi prezentas montojn, kiuj altiĝas en la kosman mallumon kaj kies tri pintoj kvazaŭ tri fingroj celas al la Tero brilanta sur la fono. La 14-jaraĝa Petro desegnis ĝin en Prago aŭ eble jam en Terezín. (La desegnaĵo sub la titolo "Sorto de desegnaĵo de Petr Ginz" aperis sur ĉeĥa poŝtmarko, kiun eldonis la ĉeĥa poŝto la 20-an de januaro 2005.)

La jarojn antaŭ la transporto al Terezín (1941-1942) Petro Ginz priskribis en sia taglibro, kiu en 2004 aperis en la ĉeĥa lingvo sub titolo *Deník mého bratra*. La libron preparis por la preso lia fratino Chava Pressburger (en Israelo ŝi ŝanĝis la nomon Eva al Chava). Nelonge poste tiu ĉi libro estis tradukita en Esperanton kaj aperis sub titolo *Taglibro de mia frato*.

Ota Ginz kaj Esperanto

Pri sia rilato al Esperanto Ginz parolis en intervjuo, kiun li donis al mi en 1973, okaze de sia vizito en Ĉeĥoslovakio. El ĝi mi citas la sekvantajn aŭtentikajn informojn opiniante, ke ili plej detale informas pri lia agado sur la esperantista kampo:

“Mi ne estis ankoraŭ 12-jara, kiam mia patro rekomendis al mi lerni Esperanton, prezentante al mi la tiam ĵus aperintan ĉeĥan Ŝlosilon. De tiam ĝis nun, kiam mi estas 77-jara, la Internacia lingvo tenas min firme inter siaj brakoj.

La rekompenco, kiun ĝi prezentis al mi, ne igas min bedaŭri la klopodojn, kiujn mi dediĉis al Esperanto. Danke al ĝi mi ĉiam sciis pli multon ol mia samaĝa kaj samsorta ĉirkaŭaĵo. Mi penetris baldaŭ inter jamajn esperantistojn kaj ili min afable akceptis, kvankam ĉi tiuj miaj novaj amikoj estis ĝenerale multe pli maturaj ol mi. Ili baldaŭ rilatis kun mi kiel kun samrangulo.

Mi ekhavis rapide la plezuron kaj honoron resti ekde tiu aĝo amiko de tiamaj elstaraj ĉeĥaj Esperanto-pioniroj: Theodor Ĉejka, Stanislav Kamarýt, Eduard Kühnl, Hynek Karel Bouška kaj aliaj.

Ankaŭ kun alilandaj esperantistoj mi serĉis rilaton. Mi memoras bone la jenajn: Carlos Charrier, la unua esperantisto en Urugvajo; Paul Nylén, kiu en Uppsala, baldaŭ post la naskiĝo de la Internacia Lingvo zorgis pri la redakto kaj preso de multaj unuatempej verkoj en Esperanto; Ivan Ŝirjaev, kolektinto de la baza materialo por la *Enciklopedio de Esperanto*. Pluraj el tiuj personoj pruvis siajn amikajn sentojn ankaŭ per ago, proponante al mi kaj al mia familio rifuĝejon en krizaj momentoj de nia vivo. Neniam mi povos forgesi tiujn noblajn homojn, inter kiuj unu en Aŭstralio, alia en Finnlando invitis nin al sia hejmo. En tempo pli nova, kiam ekflagris la milito en Israelo, ni ricevis similan inviton de amiko en Kanariaj insuloj.

Al Universala Esperanto-Asocio (UEA) mi aliĝis proksimume en 1913/1914, kaj forirante baldaŭ poste por batali kontraŭ miaj tiel nomataj malamikoj, mi kunportis kaj poste vigle uzis la UEA-Jarlibron.

Mia vigla Esperanto-agado komenciĝis nur en Irbit, felfoira urbo malantaŭ la montaro Uralo. Nun alvenis tempo, kiam la hungara Ŝlosilo devis plenumi sian specialan taskon. Kun ĝia helpo mi ekkuraĝis instrui Esperanton al miaj irbitaj samsortanoj, kies sola lingvo estis ilia gepatra, la hungara. Tiam ne ekzistis ankoraŭ la Cseh-metodo, kiun iuj konsideras mirakla, kaj mi provis laŭ propra maniero encerbigi Esperanton al miaj hungaraj kamaradoj, kies lingvon mi posedis preskaŭ nule.

Mi klare rememoras mian profundan kortuŝon, kiam ili post tempo ne tre longa devis foriri al alia tendaro. Tiam ili adiaŭis min per Esperanto mirinde bona. Kредu tamen, ke tiun sukceson ili ne atingis senlabore.

En tiu tempo mi estis jam en rilato kun la Esperanto-grupo “Espero” en Petrograd. Mi priskribis al ili mian iom nefacilan staton. Estis vintro kaj oni forprenis de ni ĉiun iom varmigan vestaĵon, same ŝuojn kaj ni estis nutritaj per manĝo neniel sufiĉa. Multaj militkaptitoj ne eltenis kaj mortis. Mia priskribo tuŝis la petrogradan grupon. En ilia baldaŭ veninta letero alparolis min ilia gvidanto Sergej Gajdovskij per ‘Frato de la verda stelo’ kaj sendis rapide vestaĵon, ŝuojn kaj monon. Mi ricevis tiam ankaŭ spiritan nutraĵon. Tia aktivulo, la esperantisto Aleksandr Saĥarov, sendis al mi la gazeton *La Ondo de Esperanto*, el kiu mi eksciis ankaŭ pri la morto de Zamenhof. Kiam ekregis en Petrograd por mallonga tempo Aleksandr Kerenskij, okazis diversaj novaj aranĝoj pri militkaptitoj. Mi kun aliaj



La familio Ginz (en Prago, 1938). Maldekstre Petro, kiu en 1944 estis murdita en Auschwitz.

estis tiam sendita el la norda parto de tiu grandega regno suden en la regionon de Don-aj kozakoj, kie estis manko de laboraj fortoj. Tie mi vivis en la familio Ŝoloĥov, laborante en muelejo, apartenanta al la patro de la poste fama verkisto Miĥail Ŝoloĥov. Tiu ĉi estis mia amiko, kun kiu mi pasigis multajn agrablajn momentojn.

Kiam mi, fininte mian soldatan deĵoron, aperis denove en Praha, mi tuj serĉis okazon por kunlaboro en la tiam leviĝanta Esperanto-organizo. Mi kolektis inter miaj amikoj grupon, kiu regule kunvenadis por zorgi pri tasko, al kiu mi atribuis unuarangan gravecon: la ĉeĥoslovaka gazetaro devas atenti Esperanton. La 'Gazeta Servo de ĈAE' trovis kunlaborantojn en plejparto de enlandaj lokoj, kie aperadis gazeto. Aliaj helpantoj serĉis kaj liveris al GS ĉiun mencion pri Esperanto, kiun ili trovis en gazetoj. La rezulto superis nian atendon: ni ricevis grandan kvanton da tiaj artikoloj, kiuj estis grandparte nia verko. La nombroj, kiujn ni tiam kelkfoje publikigis, estis iam pli altaj ol la rezulto de la tuta cetera mondo.

Ni estis konvinkitaj, ke niaj artikoloj havis influon sur la kreo de publika opinio pri Esperanto kaj ni faris kuraĝan paŝon: en la tutŝtata plej disvastigita ĵurnalo *Národní politika* ni publikigis grandformatan informon pri Esperanto-kurso aranĝota en Prago. Ni estis agrable surprizitaj: aperis neceso tuj trovi pliajn ĉambrojn kaj aldonajn instruistojn, ĉar anoncis sin pluraj centoj – mi ne plu memoras la nombron – de la lernontoj. Ne ĉiuj studis la lingvon ĝis la kursofino, ne ĉiuj estis sufiĉe persistaj aŭ talentaj, sed de tiu tempo devenas granda nombro de unuarangaj ĉeĥaj esperantistoj, kiuj ne nur finlernis la lingvon, sed krome iĝis gravaj kolonoj de la tuj poste aperanta Esperanto-movado ĉeĥoslovaka. Eĉ mi tiam instruis, sed mian tiaman sukceson mi vidas unualoke en la gazetara preparo kaj krome en la speciala maniero, laŭ kiu estis diskonigita tiu ĉi kurso.

Ne estis facile antaŭvidi la sekvojn de alispeca laboro, kiun mi komencis en 1926. Tiam mi liveris al la revuo *Radiojournal* en Prago ĉeĥan tradukon de la verko 'Babiladoj pri radio', kiun skribis en Esperanto Eŭgeno Aisberg en Parizo; ĝi sub la nova titolo *Mi komprenas fine la radion!* aperis en 1934 en la eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto. La ĝis tiam nekutima maniero prezenti humure sciencan temon kaptis la atenton de la plej potenca ĉeĥa eldonejo Orbis, kiu mem proponis al mi libran eldonon. La gvidantoj de tiu eldonejo kaj antaŭe la funkciuloj de la burĝonanta ĉeĥa radio akceptis la fakton de la unua peresperanta verko tiel simpatie, ke mi ne troigas supozante, ke la posta amika akcepto de Esperanto en la ĉeĥa radio kaj ĝia ampleksa uzo havas siajn radikojn en tiu ĉi ŝajne senpretenda verko. Ĉiukaze mi trovis baldaŭ poste en la eldonejo Orbis jam preparitan kampon, kiam mi al ĝi proponis mian alian preparitan tradukon de la origine norvega libro *Per aerŝipo al la norda poluso* de Odd Arnesen. Orbis tre rapide transdonis al mi la eldonkontrakton. Tiu ĉi ŝtata entrepreno inaŭguris per tiu lukse ekipita verko (1929) sian novan libroserion pri fremdaj landoj.

En 1927 mi transdonis al presejo en Praha manuskripton de mia kvinlingva *Radioamatora vortaro* kaj tuj poste mi ekdediĉis miajn fortojn al plia disvastigo de la verko de Aisberg. Estis ampleksaj klopodoj, daŭrantaj multajn jarojn. Estis vera monto da korespondaĵoj tuŝanta grandan parton de la terglobo, kiun mi fine devis likvidi. La Aisberg-verko ekzistas hodiaŭ en sekvaj 26¹ lingvoj, kies listo estas antaŭ mi: Esperanta, angla, bulgara, ĉeĥa, ĉina, estona, finna, franca, germana, greka, hebrea, hispana, hungara, itala, kroata, latva, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, sveda, vjetnama². En la rusa lingvo ĝi aperis en pluraj centmiloj da ekzempleroj.

En 1925 la finna ilustrita revuo *Otavainen* eldonis specialan 'Ĉeĥoslovakon numeron', pri kiu mi interkonsentis kun Vilho Setälä dum mia vizito al Finnlando.

¹ Ginz en la intervjuo mise kalkulis 27 lingvojn. – Red.

² Ŝajnas, ke Ginz ne distingis inter tradukoj kaj efektivaj eldonoj. Laŭ nia scio, la verko de Aisberg havas eldonojn en 15 lingvoj (krom en Esperanto). – Red.

Oni komprenos, ke Esperanton kiel pontlingvon oni povos plej riĉe praktikadi precipe kun landoj, kies lingvoj ne estas sufiĉe konataj reciproke³. En Fora Oriento mi havis grandan nombron de kunlaborantoj, kiuj publikigis en siaj lingvoj multe da miaj Esperanto-tekstoj, tradukitaj el la ĉeĥa lingvo. Tiamaniere en pluraj ĉinaj eldonoj aperis la poemlibro *Ĉina rideto* de Marie Pujmanová kaj amaso da aliaj tradukaĵoj. Ankaŭ por la ĉina traduko de la Ŝvejk-libro mi kunlaboris kaj liveris al ĝi specialan antaŭparolon, kiun mi prizorgis ĉe Zdeněk Ančík, fakulo pri Jaroslav Hašek. Kun Kurisu Kei, unu el la ĉefaj japanaj tradukantoj el la ĉeĥa lingvo, esperantisto, mi estas ĝis nun en ofta rilato⁴.

Pli malofta estis mia kunlaboro kun aliaj aziaj landoj. Tamen mi ricevis dankon de la Hebrea Universitato en Jerusalemo, kiam mi al ĝi sendis vjetnaman tradukon de hebrea poemo, kio estis la unua alproksimigo de tiuj du lingvoj. Ĝin faris Dao Anh Kha laŭ mia Esperanto-teksto. Ankaŭ kun Kamboĝo mi traktis sukcese pri tiulingva eldono de mia hebrea teksto, liverita en Esperanto.

Ekde mia veno al mia malnova patrujo Israelo mi konsideris mia devo utiligi Esperanton en servo al la hebrea kulturo. Mi posedas belan kolekton de miaj peresperantaj tradukoj el la hebrea, kiuj efektiviĝis per mia klopodo. Mia sola libra Esperanto-traduko el la hebrea lingvo estas *Freŝa mateno* de Reuven Kritz (1967). Mi faris tiun tradukon, kiam oni preparis en Israelo Universalan Kongreson, kiu bedaŭrinde ne okazis.

Interalie pri Israelo temas ankaŭ la japanlingva verko *Sekai no kodomo* (La infanoj de la mondo), kies materialon mi kolektis kaj tradukis en Esperanton. Tiun ĉi laboron mi faris antaŭe koncerne la ĉeĥoslovakon parton de la sama verko. Pri iuj plutradukoj mi eksciis nur hazarde.

La fundamenta Esperanto-verko pri ĉeĥoslovaka literaturo, *Ĉeĥoslovaka Antologio* (1935), kies iniciatinto mi estis kaj kune kun Stanislav Kamarýt ĝia redaktoro, estis tradukita parte en la ĉinan lingvon. Ekzistas du libretoj: 'Kolekto de ĉeĥoslovakaj poemoj' kaj 'Kolekto de ĉeĥoslovakaj rakontoj', kiuj aperis en Ŝanhajo (1948-1951). Ili estas la unuaj ĉinaj tradukaĵoj el la ĉeĥoslovaka literaturo. La tradukisto Wei Huangnu ne kaŝis, ke Esperanto ebligis lian laboron, sed mi eksciis pri la fakto nur danke al alia ĉina amiko.

Mian originalan rakonton 'Israelo, lando de mirakloj' mi publikigis en la revuo *Oomoto*, aperanta en Japanujo. Poste mi estis informita, ke oni ĝin tradukis kaj baldaŭ reprenis en japanlingva revuo kaj ankaŭ en norvega periodaĵo. Ĉeĥlingva gazeto en Usono aperigis ĝin baldaŭ poste. Iomete similan sorton havis la rakonto 'Ŝoforo de Jerusalemo' de la fama hebrea verkisto Jiĉhak Dov Berkoviĉ, kiun mi tradukis por la ĉeĥa revuo *Nový Orient* el la hebrea lingvo. Radiostacio Praha kreis el ĝi plaĉan dramon, kiun ĝi dufoje disaŭdigis. Nur tiam *Norda Prismo* decidis publikigi (en n-ro 1/1970) ĝian Esperanto-tekston, kiun mi antaŭe proponis al mia, bedaŭrinde dume forpasinta, amiko Ferenc Szilágyi, la redaktoro de tiu revuo.

Unu el aliaj sukcesoj, kiu plenigas min per sento de kontento, estas la starigo kaj gvidado de la asocia oficejo kaj librovendejo, Tiuj ĉi aranĝoj okupis kompletan etaĝon de ne malgranda domo en Prago. Niaj membroj estis pravaj, rigardante kun fiero la vastajn ĉambrojn, konvene meblitajn, en kiuj krom la supre nomitaj instalaĵoj, uzeblaj ankaŭ kiel tre konvenaj kunvenejoj, estis salajrata – eĉ se ne prince – oficisto, kompreneble ankaŭ telefono kaj eĉ unupersona dormejo, dum iu tempo regule uzata. Kaj ĉefe: la rezultoj de la librovendejo estis tiel kontentigaj, ke ili abunde sufiĉis por kovro de ĉiuj elspezoj, kiujn kaŭzis la supre nomitaj aranĝoj.

³ Por detaloj rilate al Ĉeĥoslovakio vd. Kamarýt 1983: 149-151. – Red.

⁴ Kp. Kurisu Kei, *Co mi dala česká literatura* (Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo), Dobřichovice: KAVA-PECH 1996. – Red.

Nun mi raportos pri unu el miaj iniciatoj, kiu malsukcesis: post alveno al Israelo mi rimarkis, ke la tieaj esperantistoj ne informas la mondon pri sia lando per helpo de la Internacia Lingvo. Mi miaflanke havis sperton pri tia laboro kaj aldone mi posedis en diversaj mondpartoj amikojn sendube helpopretajn. Mi do ekstraktis pri tiu ĉi problemo kun esperantistoj en skandinaviaj ŝtatoj kaj ĝia efektivigo estis proksima. La ministerio de eksterlandaj aferoj estis preta pruntedoni al mi la necesan filman materialon kaj petis de mi nur rekomendon de la Israela Esperanto-organizaĵo. Tiu ĉi tamen rifuzis doni tiun rekomendon. Ĝi evidente ne fidis min tiel kiel gvidaj esperantistoj en tiom da landoj. Kun bedaŭro mi devis rezigni pri tiu ĉi plano, kies efektivigo estus alportinta multe da utilo al Israelo kaj al Esperanto.”

En la fino de la intervjuo Ota Ginz respondis kelkajn miajn demandojn, kiuj koncernis problemojn en la Esperanto-movado. Unu el ili tuŝis la problemon de “t.n. eternaj komencantoj en Esperanto”, kiu daŭre estis kaj estas malkvietiga. La opinio de Ginz, eldirita antaŭ pli ol 30 jaroj, estis jena:

“Por atingi fundan lingvan posedon kun bona prononco, ni klopodu rilati kun personoj, kiuj laŭ konsulto de fidinda fonto majstras la lingvon komplete. Tio ne estas ĉiam kaj ĉie facila kaj tiam vi devas kontentiĝi per aŭskulto de publikaj paroladoj, kiujn aŭdigas en Esperanto-kunvenoj iu el tiaj perfektuloj. Tre utilos por sama celo gramofonaj diskoj, kies senpartian kritikon vi antaŭe zorge studos.

Pli ampleksa estas la tasko, se temas pri larĝa vastigo de via lingva vortprovizo. Ne hezitu komenci per lego de Zamenhofaj tekstoj, kiuj riĉigos vian lingvoscion. Se vi havas ioman sperton, ne estos por vi malfacile eviti tiam iujn formojn, kiuj al vi ŝajnos malnoviĝintaj. Vi legos milde fluantajn tekstojn de niaj famuloj, atentos ankaŭ tradukaĵojn, kiuj ankaŭ laŭ enhavo altiros vin. Transiru malrapide al verkoj de novtempuloj, kies rekomendoj vin allogos en gazetaj recenzoj. Ne preterlasu regulan legon de nia sola literatura revuo *Norda Prismo* kaj ne evitu eĉ verkojn fakajn, se tiu fako vin interesas.

Kiam vi post intensa studo akirus konvinkon, ke via studo estas kontentiga, preparu vin por aperi antaŭ la oficiala ekzamena komisiono. Tiu severa preparo signifos por vi memkontrolon, kiu vin gvidos al la fiksita celo.”

Por bona posedo de la lingvo estas necese legi bonajn Esperanto-librojn. Ginz respondis mian demandon pri liaj preferataj libroj jene:

“Esperantaj libroj, kiuj kaptis mian atenton estis kompreneble aliaj en mia juneco ol tiuj, kiujn mi sinsekve elektis kun progreso de mia aĝo. Kiel knabo mi ripete englutis *Faraonon*. Pro ĝia streĉa enhavo, kaj eble ĉar mi rekonis ĝian bonan lingvon. Kiam, kiel ŝajnis al mi, Ido ekminacis mian amatan Esperanton, mi diligente studis ĉion pri la Ido-problemo, por ke mi povu esti unu el la kontraŭbatalantoj. Daŭre ĝis la lasta tempo mi akiradis ĉion pri Zamenhof, kies verkojn mi jam antaŭe posedis. Allogaj estis por mi ĉiuj antologioj, el kiuj mi konatiĝis kun literaturoj, al mi ĝis tiam nesufiĉe proksimaj. Poste mi klopodis ne preterlasi lingvajn studverkojn. Ĝis mia foriro al Israelo mi sekvis kaj klopodis al mi havigi ĉion, kio aperis en kaj pri Esperanto en la ĉeĥaj landoj.”

Je la fino de la intervjuo mi demandis pri interesaj travivaĵoj, kiujn li spertis dum sia multjara aktivado en la Esperanto-movado. La respondo estis jena:

“Ili estis multaj. Nur ekzemple mi prezentu jenajn:

La neforgesebla eldonanto de Literatura Mondo Vilmos Bleier konsentis kun mi dediĉi en la jaro 1932 unu numeron al Ĉeĥoslovakio. Mi kolektis materialon kaj post la apero mi sendis unu ekzempleron de tiu pompa numero al Tomáš G. Masaryk, la unua ŝtatestro de Ĉeĥoslovakio. Ne pasis multaj tagoj kaj mi ricevis leteron de la Prezidenta Oficejo kun danko de la prezidento pro sendo de la revuo. Al la letero estis aldonita la libro ‘Kiel labori?’ de Masaryk, kun lia prapramana subskribo.

Alia interesa okazo por utiligo de Esperanto estis mia kunlaboro kun la Instituto de la fama dana verkisto Hans Christian Andersen. Ekde la jaro 1924 mi sendadis al ĝia muzeo en Odense ĉion, kio aperis en la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj pri Andersen. En 1925 tiu Instituto tre kore invitis min al partopreno en festo, aranĝita okaze de la 150-jara naskiĝjubileo de la granda dano. Ĝi esprimis al mi tiam dankon pro la multjara subteno de tiu Instituto, per kiu ago mi pruvis la altan nivelon de la ĉeĥoslovaka presarto kaj la aprezon, kiun Andersen ĝuas en Ĉeĥoslovakio.

Kun sinjorino Klara Zamenhof mi konatiĝis persone en 1924 dum la Viena Kongreso. Oni vokis min, kiam la sinjorino post la kongreso intencis kuraci sin en la slovaka kuracejo Trenčanské Teplice. Mi povis liveri al s-ino Zamenhof ĉiujn deziritajn informojn kaj krome rekomendon, skribitan sur oficiala leterpapero de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. Mi estis feliĉa, eksciinte poste, ke sur la bazo de tiu rekomendo, en kiu mi prezentis la personecon de s-ino Zamenhof, ŝi ricevis tie, post festa bonvenigo, luksan loĝejon kun unuaranga manĝo kaj kuracista traktado, ĉion senpage.”

Bibliografio

- Franěk, Jiří F. (2006): *Ota Ginz. Od Petra Ginze a raketoplánu Columbia až k Šolochovovi* (De Petr Ginz kaj raketoplano Columbia ĝis Ŝoloĥov). Praha: Sdružení bývalých vězňů koncentračního tábora Schwarzheide (Kolektivo de la estintaj arestitoj en la getto Schwarzheide). – La broŝuro enhavas ankaŭ anglan kaj germanan tradukojn.
- Ginz, Ota; Stanislav Kamarýt (1935, red.): *Ĉeĥoslovaka Antologio*. Budapeŝt: Literatura Mondo.
- Kamarýt, Stanislav (1983): *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
- Modan, Doron (2005): “La esperantisto, kiu fine atingis la kosmon”. *Esperanto* 98/3: 54-56.
- Novobilský, Vlastimil (1973): Sonbenda intervjuo kun Ota Ginz (el la serio “Elstaraj esperantistoj pri si mem”). La sonregistraĵo nun troviĝas en la Viena Esperanto-Muzeo.
- Pressburger, Chava (2005a): *Deník mého bratra*. Praha: Trigon Praha. (Tradukita en plurajn lingvojn.)
- (2005b): *Taglibro de mia frato. Memornotoj de Petr Ginz el la jaroj 1941-1942*. Trad. Vlastimil Novobilský kaj Věra Novobilská. Dobřichovice: KAVA-PECH.

Vlastimil Novobilský

Nask. 1935. Emerita profesoro. Esplorinstituto de anorganika kemio, 1958-1968; Pedagogia Fakultato en Ústí nad Labem (Ĉeĥio), 1968-1989; dekanato de la fakultato, 1990-1991. Kunfondinto kaj rektoro de Universitato J.E. Purkyně en Ústí n.L., 1995-2001. Prikemiaj publikaĵoj en- kaj eksterlande.
